

PENSEO

N-ro 290

dec. / 2015

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 26-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



vivu saĝaj homoj!

tiuj, kiuj volis sin protekti kontraŭ
atombomboj
per katuno blanka kaj per kuirŝalo,
ja travivis la mondfinan tagon stokante
kandelojn.
nun arkeoj de riĉuloj eksoifas al inversa
maro.

2012.12.24 - 18

larmoj krokodilaj

katastrofoj estas ja kreitaj per libero.
mondan finon homoj sub la paca flago spertas.
larmoj krokodilaj pagas kredon kaj apogon.
por diabloj mortaj paradizo nun apertas.



2012.12.17 - 10

la alia bordo

por sinmortigi li en maron saltis;
naĝadon li ellernis en sekundo kaj sin savis.
mevoj kaj delfenoj gvidis la pli rektan kurson.
post tago li atingis la alian bordon.


2012.12.12 - 7

knabineto vendanta revmaizaĵon

sub strata lampo trema pro glacio, knabineto
jen krevmaizaĵon vendas jen ekzercojn faras.
ŝin konfuzas la priskribo de andersen inta:
ĉu alumetoj brulis kaj stelaro vere falas?

2012.12.28 - 6

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Ekzisti

Animoj flugas
sur birda grundo;
sed la soleco
de ĉiu persono
ne komunikeblas.



Juiz de Fora, 04/11/2015

Elegio

La Rivero Dolĉa funebras,
kaj malrapide trenas
la neseputan kadavron mem
el perversa koto
vomante en oceanon
koleron kaj malĝojon.

La funebraĵo de l' rivero, tamen,
ne taŭgas por ĉi tiu ŝajna poemo;
sed almenaŭ ni povas
eklumigi vortojn el revoj
kaj espero surborde de ĉiu verso.

Juiz de Fora, 25/11/2015

Mori (Usono)



AFORISM-e(9) G

aja, kontenta, feliĉa
persono
estas homo la plej riĉa,
SEN mono!

Ŝtelisto malgranda
ŝtelas kaŝe ION,
ŝtelisto granda
ŝtelas malkaŝe ĈION!

Riĉuloj povas certi
pri siaj homaj rajtoj
Nur se malriĉajn ulojn
ne trafas maljustaj batoj!

Se idiotoj
ne estus multaj
la mondon ne regus
homoj stultaj!

Ĉiu homo havas la rajton
je amo senkondiĉa,
Ĉiu homo havas la rajton
esti plene feliĉa!

Inter naskiĝo
kaj morto
vi estas la majstro
de via sorto!

Tri homoj al mi ne plaĉas

tiu, kiu simple aĉas,
tiu, kiu pri ĉiuj juĝas kaj klaĉas,
tiu, kiu ĉie kraĉas!

Se vi deziras esti
grandanima homo
estu ja sindonema
Samkiel arbo de pomo,
disdonu labor-fruktojn
tutegale al ĉiuj
zorgu nek pri pago,
nek pri bona nomo.

Homo kiu batalas
sen nobla kialo
estas pli sovaĝa
ol sovaĝa animalo!

La diferenco
inter animalo kaj homo
plejparte estas
aspekto kaj nomo!

Inter animaloj
ne ekzistas generaloj
sed inter generaloj
Ja troviĝas animaloj!

Homo por vivi riĉe
kaj feliĉe,
sekvu amon kaj ĝojon
senkondiĉe!

Ne provu homojn
kiam la tablo plenas
provu homojn
kiam vi helpas bezonas.



Paŭlo Silas (Brazilo)



MANGĪ LA PROPRAN KORON

Sub jarcenta palaco-arko,
Duminuta facila tasko.
Ĉar mimik' malsufiĉis tute,
Ekparolos kaj krios multe.

Tradicio kaŭranta lerte.
Man' ĉe mano insistas krede,
Ke l' justec' plenumiĝu tute.
Buŝ' verama sanktiĝas mute.

Kaverneca gorĝ' alparolas
Dum la dentoj la langon voras.
Harstariga indiferento.
La oreloj ne kaptas senton.

Dorsdirekten okul' turniĝas
Por konstati, ĉu cerb' sufiĉas.
Du junuloj promenas kune,
Maljuniĝas la histoj dume.

Bonintenca ridet' infana
Sur afiŝo rasisme flama.
Teori' mallogika regas.
Hombuĉad', pravigite, ekas.

Pied' paŝas sur pinglo-lito.
Pek' gepatra, sed kulpa ido.
Kaj ignori doloron ajnan.
Grand', normalo, malgrando kaj nan'.

Mi komprenas problemon vian;
Sed, atendu, mi solvas mian...
Ĉu real', kruelega, estas?
Socieme, la homoj bestas.

Ni konstruas, en maro, muron
Por enteni la ond-ululon.
Se jam buŝo sanktiĝis mute,

Nun en kaĝ' de zo' sidu surde
Komputilmensa homfiguro.
Tie ĝuos ĝi la sekuron
De interdirektita sino.
Interparoli fariĝis krimo.
Kaj atenti, neeblas plu:
Nin satigas la sekura ĝu'.



Cezar (Germanujo)



Ne pretekstu poezio

I

La preteksta poezio,
gravas nur por glorkron-dio,
konfuzigas poezio
pri preteksta nula io.

Nebulvandoj de pretekstoj
helpas ne pri bonaj tekstoj.
Poezio nin konfuzas,
se tamtamo vante ruzas.

II

Se pavverkas konfuzulo,
ĝi ne helpas eĉ al pulo.
Se la poetin' nur lindas,
ŝiaj versoj ne legindas.

Se poeto grandan provas
kaj nur sterkon fine kovas,
ni kun rajto lin misfidas
kaj aplaŭdon nian bridas.

III

Poezio estu multo,
sed neniam pura stulto,

kaj neniam falsa sento
en furzita brua vento.

Poezio veku sentojn,
foje ankaŭ akrajn dentojn,
sed neniam ĝi deliru
aŭ miasmojn nur elspiru.



IV

Poezio estu vera,
delikata kaj tenera;
kaj ĝi estu pli ol tio,
foje eĉ jubila krio.

Poezio estu homa,
ekster si kaj eĉ endoma;
poezio estu ĉio,
kruda dir' kaj ĝojebrio.

Ne pretekstu poezio,
ĉar sur ver' sin bazas ĉio;
flustru poezi' kun honto
kaj fanfaru sur la monto.

Jadranka Miric (Serbujo)



Estu ĉiam preta

La tutan nokton
pluv-neĝis. Malvarmeco
akre pikas vin.

Faladas gutoj
verŝiĝante laŭ korpo
al ĝia hufo.

Kavalerio
kvietas por la gasto
honorigota.

Minutoj pasas.
Delegitoj aplaŭde
anoncas gaston.



Siv Burell (Svedujo)



La gazetoj raportas pri krimoj

La gazetoj raportas pri krimoj,
sed laŭ statistiko troviĝas limoj
de la krimnombro, ĝis fakte ne pliiĝas,
malgraŭ ke popolnombro multobliĝas.

Kelkaj faktoj estas notindaj
ke It-ludoj estas substituajoj mirindaj
por armil-adorantaj junuloj,
pafas nur fantazie la ludantoj.

Alia fakto estas la aŭta ŝtelsekureco,
kiu celas al malalta krimeco.
Junuloj troviĝas en longtempa studado
dum sia riska periodo por ŝtelado.

Do fidu ke pliboniĝos.
La mondo pli bona iĝos.



pentraĵo de la aŭtorino

Chico Buarque kaj Vinícius de Moraes



Valseto

En certa tag' li venis kun malsam'
ol la fason' de la kutima far'.
Rigardis ŝin kun multe pli da varm'
ol estis lia kutima rigard'.
Kaj ne malbenis sian vivon
tiom kiom emis en la ordinar'.
Por ke ne plu en senmotivon
ŝi sin igu li invitis ŝin al danc' laŭ par'.

Kaj do ŝi ekbeligis sin
laŭ rajt' al sia longkaŝita temerar'.
Kun sia dekolitita rob'
kiu je ŝrank' odoris pro l' gardada star'.
Tuj ili du kun man' en mano
estis kiel ne plu emis ĉe l' homar'.
Kaj plenaj de videbla plaĉo
iris al la placo por sindon' al ĉirkaŭbrak'.

Kaj tie ili longe dancis
por la plaĉ' de ekvekiĝa najbarar'.
Kaj la feliĉo tiom grandis
ke la tuta urb' jam brilis sen kompar'.
Frenezaj kisoj do okazis,
raŭkajn kriojn kaŭzis kun granda malŝpar'.
Kaj l' mondo en konsent'
tagiĝis en silent' kaj pac'.

Elportugaligis



Uel Roŝa (Brazilo)

Edward Jaŝkiewicz

EPITAFIO

(Ne perdu humoron!)

Ĉu la lokojn pli trankvilajn al mi povas montri
iu

Al nekropoloj similajn? – ŝajnas tamen, ke
neniu.

Edzo ne plu kontrolata pro ĵaluzo de edzino,
Plu ne estas jam serĉata de la knabo la
knabino.

Blankajn noktojn vi ne vidas, neniun io
doloras,

En varmego vi ne sidas, eĉ severaj vintroj
foras.

Nur kuŝas vi... Malgraŭ tio, ne doloras vin eĉ
spino,

Ne danĝeras dentkario, neŭrozo, aliinklino.

Nek kancero vin danĝeras, nek
malsanalkoholismo,

Pro malsat' vi ne suferas, nek pro la alia ismo.

Vento rekten al okuloj tie jam ne blovas tute.

Plu ne mordas vin jam kuloj kaj edzino sidas
mute.

En eterna ĉi kuŝejo mono jam ne bezonata,

Ĉar lupago por loĝejo tie ja ne aplikata.

La abundo kaj mizero tie daŭras en konkordo,

Do nenie sur la tero regas la simila ordo.

Nek tumulto, nek kriado... Ĉiuj kuŝas en
amasoj,

Sanaj pulmoj sen fumado, ne ekzistas jam
forlasoj.

Pasis en ĉi lok' sufero, la plej laŭta nur silento.

Kuŝas en la sama tero – juna, olda en
konsento.

Superflua la higieno, okulvitroj, manĝilaro,

Ne turmentas jam migreno, ne plu estas
kontraŭstaro.

Ne ekzistas ŝerctrudistoj, nek perforto, nek
ŝtelado.

Kvankam estas la ŝtelistoj, nek vin tuŝos
har-falado.

Kuracisto, ĉarlatano, - bezonataj ne plu iĝos,
Ĉar malsanoj en lok' tiu neniam evidentiĝos.
Tie ja ĉiuj knabinoj egalrangaj... Jen la fakto.
Elvilaĝaj aŭ grafinoj... Ne plu estas jam
infarkto.

Urbkvartala policisto, profesoro kaj studento,
Provoso, kriminalisto, kuŝas kune en
konsento.

En la milda ĉi klimato jam kvieta ĉiu kuŝas.
Ne militas jam soldato, nek unu alian tuŝas.
Nenio en tiu domo estas jam plu bezonata,
Nek la sperto, nek diplomo, nek ia aĵo amata.
En la ĉi komuna rondo kune kuŝas la forstisto
Kun bankiero, vagabondo – kaj la pastro kun
ŝtelisto.

Tie eĉ viroj, virinoj – adultojn, kokrojn ne
timas,

Reciproke la putinoj kun honestaj sin estimas.
Stratlanternoj ne ekzistas, procesojn faras
neniu,

Pro kalumni' vi ne tristas, ordo regas en lok'
tiu.

Vidas vi nek narkomanojn, nek la
dipsomaniulojn,

Vi ne spertas la ĉikanojn, ne bezonas vi
spegulojn.

Kuŝas tie stultaj, saĝaj, episkopo, monachino,
Sveltaj, dikaj, diversaĝaj..ne ekzistas
disciplino.

Pli bone ol en ĉielo estas en ĉi terkaverno,
Sed ne mankas la kruelo – kuŝo daŭras por
eterno.

Elpoligis



Edward Jaśkiewicz

(Pollando)

Ali Podrimja (1942-2013)

Mi estas sovaĝa besto

Fortikan dorson mi havas Sinjoro mia
Kruojn pli fortikajn ol vi pensas

Kaj pli rapidajn
Kiel fulmo mi trakuras la monteton
Super kiu regas via majesto
Miaj piedoj enfalas en la teron ĝis la genuoj
Sinjoro mia

De jarcentoj miljaroj mi portegas Vin pene
Kaj povas iri kun vi tien kie subiras
Via suno kaj komenciĝas mia tago

Tien

Ĝis la Tombo

Fortikan dorson mi havas

Kruojn fortikajn rapidajn kiel fulmo

Povas okazi ke mi falos sur la manojn genuojn

Sed vin mia Sinjoro mi portos al viaj
muskokovritaj sanktejoj

Tra via domo sonas

Kvazaŭ nova vorto sed ĉio putris interne

Do, mi timas pri via sano Sinjoro mia

Pri viaj vortoj pri eluzitaj banalaj refrenoj de
via kanto

Ĉar vi estas el tiuj kiuj merdon tordos al vipo

Mi timas Sinjoro mia

Ke iun tagon vi stumblos

Sur mia ĝiba dorso kaj falegos

Kaj vian kapon Sinjoro mia

Kiel pilkon infanoj piedbato en la ludejo

Kaj daŭre mi havas fortikan dorson Sinjoro
mia

Fortajn piedojn enradikiĝintajn

Ĝis la kolo mi sidas en la tero

Sinjoro mia

Kaj Vin mi portos

Vin tien

Tien

Ĝis la Tombo

Mi ja estas sovaĝa besto

Esperantigis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO KVARA

Tiu ĉi homa mondo

§04-05

Vojaĝante en Shangqiu, Nanbo Ziqi vidis arbegon mirinde strangan, kiu estis tiel kolosa, ke sub ĝia ombro mil kvarĉevalaj jungitaroj povis trovi ŝirmon. Ziqi diris: “Kiaspeca arbo ĝi estas? Ĝia ligno devas esti neordinara.” Kiam li levis la okulojn, li trovis, ke la branĉoj ĉiuj estas tro tordaj por esti uzataj kiel ĉevronoj. Mallevente la okulojn, li vidis, ke la trunko estas tiel fendoplena, ke ĝi ne taŭgas por farado de ĉerkoj. Kiam li lekis ĝian folion, ĝi vundis kaj ulcerigis lian buŝon. Kiam li flaris la arbon, ĝia odoro estis tiel forta, kvazaŭ ĝi povus ebrigi homojn por tri tagoj.

“Ĝi estas arbo vere senutila,” diris Ziqi. “Jen kial ĝi povas kreski ĝis tia grandegeco. Ho, kia simileco estas inter la alte spirita homo kaj tiu ĉi senvalora arbo!”

§04-06

En la regno Song estas regiono nomata Jingshi, kiu taŭgas por kreskado de katalpoj, cipresoj kaj morusarboj. Arboj kun ĉirkaŭmezuro de unu aŭ du spanoj estas hakfaligitaj por esti uzataj kiel simiaj sidostangoj; arboj kun ĉirkaŭmezuro de tri aŭ kvar spanoj estas hakfaligitaj por esti uzataj kiel traboj en altaj domoj; arboj kun ĉirkaŭmezuro de sep aŭ ok spanoj estas hakfaligitaj por esti uzataj kiel tabuloj de ĉerkoj por riĉuloj aŭ altranguloj. Rezulte de

tio tiuj arboj ne povas vivi sian plenan vivdaŭron kaj mortas antaŭmaturan morton sub la hakado. Tio estas malfeliĉo, kiun ili kaŭzas al si per sia utileco. Sammaniere bovoj kun blanka frunto, porkoj kun suprenturnita muzelo kaj homoj suferantaj hemoroidojn ne povas esti uzataj kiel oferoj al la Rivera Dio. Ĉiuj sorĉistoj bone scias pri tio: ili rigardas tiujn ĉi kreitaĵojn malbonaŭguraj. Tamen la alte spiritaj homoj rigardas tiujn ĉi kreitaĵojn la plej bonaŭguraj.

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Licius (Ĉinujo)



Beleco de Ĉinesko

— laŭ ĉinesko Tiaxiaoling*

Kanti, kanti,
brile diamanti,
plene de animo
per ĉineska rimo.
Miro, miro:
krio en sopiro.

**Tiaxiaoling (Firta Kanto): ĉina fiksfirma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimarango de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.*

**Saluton al la Granda Okazo de la 30-a
Datreveno de Guangdong-a
Esperanto-Asocio
(2012)**

— laŭ ĉinesko Xijiangyue*

En la nordo kovras blanka neĝo;
 en la sudo brilas ruĝa suno. —
 Brave mi flugas trans maloportuno
 per facila vent' kun koro juna.

Tridek-jare, daŭrigas l' aferon
 de l' verda stel', samidea kuno
 ni, rikoltadas en ora aŭtuno,
 semas esperon sur tero nuna.

*** **

En la nordo blanka neĝo kovras;
 en la sudo ruĝa suno brilas. —
 Esperantistoj neniam senilas:
 mi brave soras per vent' facila

Tridek-jare, daŭrigas l' aferon
 ni, samidee, antaŭeniras
 rikoltante. — La verda stel' stirilas. —
 Sur la tero kreskas sem' aspira.

**Xijiangyue (Luno super Okcidenta Rivero): ĉina fikforma
 poemo el du strofoj kun po 4 versoj de 66,7,6 silaboj, laŭ
 rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)*

Jadranka Miric (Serbujo)

Al Tago dediĉita al Mortintoj

—laŭ ĉinesko Sopir-al-Sudo*

Aŭtuna
 tag' memorplena
 oriĝas kiel floroj
 sur tombo, signoplena,
 foje serena.

Okuloj
 ruĝaj de larmoj.
 Koro apenaŭ batas.
 Malgajaj niaj karmoj.
 Koro sen varmoj.

Profunda
 neevitebla,
 esplora cerbumado.
 Sorto komprenebla,

ne plu ŝanĝebla.

Rideto
 sur rando lipe,
 iomete amara.
 Vivo batita vipe
 sed pacopipe.

Memoroj
 postkuras min. Ve.
 Neniam ni renkontu,
 nek estos kune.
 Ve, doloras tre.

**Sopir-al-Sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fikforma poemo el kvin
 versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Alphonse Daudet (1840-1897)



La Eta Spiono

Li estas nomata Stenne,
 eta Stenne. Li estis knabo el Parizo, malforta
 kaj pala, eble 10-jara aŭ 15-jara. En rilatado
 kun tiaj etuloj, oni neniam sciis, kian aĝon ili
 havas efektive. Lia patrino mortis kaj lia patro,
 antaŭe kiel soldato de mararmeo, nun
 prizorgis skvaron en la Kvartalo de
 Templo. Lin konis kaj respektis tiaj hastemaj
 parizanoj, kiaj infanoj, servistinoj,
 maljunulinoj kunportantaj faldeblan tabureton
 kaj malriĉaj patrinoj, kiuj venis ŝirmi sin sub
 arbombro proksime al la trotuaro. Oni sciis,
 ke bonintenca kaj preskaŭa patrineca rideto
 kaŝiĝis sub liaj dikaj kaj rigidaj lipharoj, kiuj
 timigis hundojn kaj alkroĉgmuloj al la benkoj
 en la parketo, kaj ankaŭ sciis, ke por vidi tian
 rideton, oni nur bezonas diri al la maljunulo:
 “Kiel fartas via infano?”

Patro Stenne tre amis lian infanon! Ĉe
 vesperiĝo, post la lernejoj horoj, eta Stenne
 iris al li en skvaro kaj ili ambaŭ promenis sur

vojeto tie. Ili haltis ĉe ĉiu seĝo por saluti siajn konatojn kaj respondi al ilia saluto. Kiel feliĉa la maljunulo estis! Malfeliĉe, pro tio, ke la urbo estis sieĝita, ĉio ŝanĝiĝis. La skvaro de patro Stenne estis fermita kaj uzata kiel deponejo de benzino, kiun la kompatinda maljunulo estis devigita atente gardi en ĉiu momento. Ĉiutage li, malpermesite fumi, pasigis siajn tagojn en tiuj dezertaj kaj malordaj boskoj kaj reiris hejmen tre malfrue renkontiĝi kun sia filo. Kiam li parolis pri la prusoj, li ankaŭ devus rigardi siajn lipharojn... Eta Stenne ne tre plendis kontraŭ tiu ĉi nova vivo.

Infanoj trovis la sieĝadon tre amuza, ĉar ili ne plu vizitis lernejon nek interhelpan studgrupon. Ĉiutage oni pasigis ferion kaj svarmis al stratoj, kvazaŭ al placo de kampara foiro ...

La infano restis ekstere de la mateno ĝis la vespero por pasumi. Li sekvis la trupojn iri al kazerno ĉe la flanko de remparo, laŭ sia ŝato elekti rimarkindan militan orkestron; en tiu ĉi rilato eta Stenne estis tre lerta. Li povis klare diri al vi, ke la bando de la 96-a bataliono estis tute ordinara, sed tiu de la 55-a bataliono estis eksterordinara. Iafoje li iris spekti la nacian taĉmenton de speciala misio en ekzercado aŭ viĉariĝo ...

Kun korbo sub sia brako, li premiĝis en longaj vicoj, kiuj etendiĝis antaŭ la kradpordoj de vendejoj kaj panbutikoj, sub la malhela ombro de la vintraj matenoj sen gaso. Tie, starante en pluvakvo, oni interkonatiĝis kaj parolis pri politiko. Ĉar li estis la filo de s-ro Stenne, la aliaj volis aŭskulti lian opinion. Sed la plej amuza estis la famkonata korko-vetludo, kiu ekfuroris inter la soldatoj de Bretona nacia taĉmento de speciala misio dum la urbo estis sieĝata. Se eta Stenne troviĝis nek ĉe la remparo nek en panbutikoj, oni sukcesis trovi lin en la placo Akvoturo. Kompreneble li ne partoprenis en vetludo, ĉar vetludo bezonis multe da mono. Li estis

perfekte kontenta, kiam li povis propraokule rigardi tiujn ludantojn! Inter ili estis altulo en blua supertuto, kiu ĉiufoje metis vetaĵon de cent moneroj da su-oj, igis etan Stenne nereteneble envii. Kiam li ekkuris, oni povis aŭdi tintadon de écu-j¹ en lia supertuto... Iutage lia monero ruliĝis ĝis la piedoj de eta Stenne. Levante la moneron, la altastaturulo duonvoĉe diris al li: “Ĝi vin enviigas, ĉu?... Nu, se vi volus scii, mi sciigos vin, de kie mi havigis al mi tiun monon.”



Post raŭndo de vetludo li kondukis etan Stenne al angulo de la placo kaj proponis al li vendi ĵurnalojn al prusoj... Oni povis akiri po 30 frankojn por ĉiu vojaĝo. Komence eta Stenne indigne rifuzis, kaj li ne iris al la hazardludejo jam tri tagojn. Teruraj tri tagoj. Li ne havis apetiton, nek povis bone dormi. Nokte li vidis amason da galoŝoj starantaj ĉe la piedo de sia lito kaj brilantaj monerojn de cent frankoj flirti paralele.

La tento estis tro forta. En la kvara tago, li reiris al la placo Akvoturo kaj tie vidis la altulon, kiu faligis lin en sia kaptilon ...

En neĝa mateno ili ekiris, kun tolsako sur la ŝultro kaj ĵurnaloj kaŝitaj sub sia kitelo. Kiam ili alvenis al la pordego de Flanders², ĵus aperis la unuaj lumetoj de la tago. Altulo kondukis etan Stenne antaŭ la garnizonan gardostaranton, novan soldaton kun ruĝa nazo kaj bonkora mieno, kaj diris al li per kompatinda voĉo:

“Lasu nin trapasi, mia bona sinjoro ... Nia panjo malsaniĝas, paĉjo mortis. Mi kaj mia frateto volas iri en kampon kaj elfosi iom da terpomojn.”

Dirante, li ekploris. Eta Stenne treege hontis kaj mallevis la kapon. La gardostaranto pririgardis ilin momente kaj ĵetis ekrigardon al dezerta ŝoseo neĝkovrita.

“Rapide trapasu,” li diris al ili kaj foriris. Ili tuj suriris la vojon kondukantan al Aubervilliers. Altulo laŭte ridegis.

Kvazaŭ en sonĝo eta Stenne malklare vidis la kazernon faritan el fabriko, barikadojn negardatajn, gutante malsekajn ĉifonajn vestojn sunumitajn en la kazerno, altajn kamentubojn breĉitajn, nefumantajn, trapikintajn matennubon kaj skrapantajn la ĉielon. Gardantaj soldatoj staris je po peco de distanco. Kaj kelkaj oficiroj kun kapuĉo teleskope observis tie. Malantaŭ la tendetoj malsekigitaj de neĝpluvo la bivakaj fajroj estis baldaŭ estingiĝontaj. La altulo bone konis la vojojn, ili trairis kampojn por eviti gardostarejojn. Sed kiam ili alvenis al granda posteno de franca nacia taĉmento de speciala misio, ili ne povis eviti tiun lokon. La soldatoj de taĉmento en malgranda pluvimuna mantelo, kaŭris en la tranĉeo plena de akvo, laŭlonge de la linio de fervojo de Soissons. Ĉifoje la rakonto de la altulo efikis neniom, kaj soldatoj neniel volis lasi ilin trapasi. Tamen, ĝuste kiam li ploradis, el la deĵorejo de fervoja interkruciĝo elvenis maljuna serĝento, kun tutblankaj barbo kaj hararo, kaj kun la vizaĝo plena de sulketoj, kiu tre similis patron Stenne.

“Nu! Ne ploru plu, etulo!” li diris al la infanoj, “Ni lasos vin iri elfosi terpomojn, sed unue eniru en la domon kaj iom varmigu vin... Ĉi tiu etulo baldaŭ glaciigos de frostoj!”

Ve! Eta Stenne tremis per la tuta korpo ne pro malvarmo, sed pro timo kaj honto... En la posteno ili vidis kelkajn soldatojn kuntiriĝi ĉirkaŭ malforta fajro, vere kiel tiu de kuirforno ĉe la hejmo de la vidvino, kaj baki super la fajro biskvitojn trapikitaj per bajoneta pinto. Ili moviĝis flanken por cedi sidlokojn al la du infanoj. Ili donis al infanoj po taseto da vino kaj taseto da kafo. Kiam ili trinkis vinon kaj kafon, oficiro venis antaŭ la pardonon, elvokis la serĝenton, mallaŭte parolis kun li kaj rapide foriris. “Knaboj!” ĝoje diris la

serĝento reveninte. “... Ni batalos ĉi-nokte ... Iu kaptis prusan informon ... Mi kredis, ke ĉifoje ni povos repreni tiun ĉi sanktan ĉefurbon Bourget el iliaj manoj !”

Meze de soldatoj sonoris laŭtaj ĝojkrioj kaj ridoj. Ili kantis, dancis, poluris bajonetojn. Profitante de ĉi tiu tumulto, du infanoj forkuris.

Transpasinte la tranĉeon, antaŭe estis nur ebenaĵo, kaj ĉe la fino de la ebenaĵo estis unu blanka muro kovrita de embrazuroj. Ili piediris al ĉi tiu muro kaj iom haltis ĉiupaŝe por ŝajnis pluki terpomojn.

“Ni reiru... Ne iru tien,” insistis eta Stenne.

La altulo eklevis siajn ŝultrojn kaj plu iris antaŭen. Subite ili aŭdis krakadon de ŝargado.

“Kuŝiĝu!” dirante, la altulo ĵetis sin sur la teron.

Apenaŭ li kuŝiĝis, li ekfajfis. Aŭdiĝis responda ekfajfo el la neĝkovrita tero.

Ili antaŭeniĝis rampante ... El la tero antaŭ la muro aperis du flavaj lipharoj sub malpurega bereto. La altulo saltis en la tranĉeon kaj iris al pruso.

“Li estas mia frateto,” li diris, montrante al eta Stenne.

Eta Stenne estis tiel malalta, ke la pruso ekridis, ekvidinte lin.

Li estis devigita preni etan Stenne en siaj brakoj por levi lin ĝis la breĉo de neĝmuro. En alia flanko de la muro estas alte plenigita teramaso, kuŝintaj arboj, la nigra truo sur la neĝtero kaj la lernejo, en ĉiu truo estas la sama malpurega bereto, la sama flava barbo, ili larĝe ridetante rigardis la infanojn pasi.

En unu angulo, la loĝdomo, kie loĝis ĝardenisto antaŭe, nun fariĝis kontraŭobusa ŝirmejo fortigita per arbotrunkoj. Sube de ŝirmejo plenplenis soldatoj. Iuj el ili ludis pokeron kaj la aliaj preparis buljonon super arda fajro. En aero ŝvebis aromo de brasiko kaj grasa viando. Kiom malsamas ĉi-tiea situacio, kompare kun tiu de la tendaro de

gerilo! Supre troviĝis kelkaj oficiroj. Oni povis aŭdi ilin ludi la pianon kaj malkorki botelojn de ĉampano. Kiam la du etaj parizanoj eniris, la oficiroj ilin renkontis per laŭtaj ĝojkrioj. Du infanoj donis ĵurnalojn al ili, poste la oficiroj tostis por ili kaj lasis ilin paroli. Ĉiuj oficiroj montris kaj arogantegan kaj kruelegan aspekton, sed altastaturulo oficirojn amuzis per sia vervo de antaŭurbano kaj la ĵargono de kanajloj. Ili ridetis kaj ripetis tiujn obscenajn vortojn, pri kiuj ili videble interesiĝis.

Eta Stenne ankaŭ tre volas diri ion por pruvi, ke li ne estas stultulo, sed io malhelpis. Starante kontraŭ li, unu prusa oficiro, pliaĝa kaj seriozmiena ol aliaj oficiroj, legis la ĵurnalon, aŭ pli precize, ŝajniĝis sin legi la ĵurnalon, ĉar lia rigardo neniam forlasis etan Stenne.

Lia rigardo estis plena de amemo kaj riproĉemo, kvazaŭ li havus en sia hejmurbo samaĝan infanon kiel etan Stenne, kaj li ŝajne dirus en la koro: "Mi preferus morti ol vidi mian filon okupiĝi pri tia afero.

De tiu momento, Eta Stenne sentis manon, kiu pezis sur lia brusto, kvazaŭ ne lasante lian koron bati. Por sin liberigi de ĉi tiu angoro, li komencis drinki. Momente li eksentis, ke ĉio rotaciis ĉirkaŭ li. Li malklare aŭdis, ke lia kunulo, meze de sovaĝaj ridegoj de la oficiroj, mokridas la Nacian Gvardion kaj ties manieron en ekzercado, kaj imitas militan revuon en Marais kaj noktan alarmon sur la urbomuro. Iom poste la altulo mallaŭtigis sian voĉon kaj la oficiroj ĉiuj alproksimiĝis al li seriozmiene. Tiu malbenita ulo al ili malkaŝis la informon pri la atako de la nacia taĉmento de speciala misio...

Ĉifoje, Eta Stenne kolere stariĝis, ĉar li venis al la klara kompreno: "Altulo, ne diru... Mi ne volas." Tamen, la altulo nur ignoris lin kun rido kaj daŭrigis sian parolon. Antaŭ ol li finis paroli, ĉiuj oficiroj stariĝis. Montrante al la pordo, unu el ili diris al la du infanoj:

"For !"

Ili komencis interparoli pri tio en la germana lingvo. Elvenante, la altulo faris monon tintadi, li estis fiera kiel guberniestro. Eta Stenne lin sekvis kun kapo mallevita. Kiam li pasis preter la pruso, kies rigardo lin embarasigis, li aŭdis lian afliktitan voĉon: "Estis hontinde. Tio... estis malhonora."

Liaj okuloj plenis de larmoj.

Tuj kiam ili atingis la ebenaĵon, la du infanoj komencis rekuri rapide. Ilia sako estis plena de terpomoj, kiujn prusoj donis. Kun tiuj terpomoj ili tre facile trapasis la tranĉeojn de la naciaj taĉmentoj de speciala misio. La soldatoj preparis sin por la nokta atako. Trupoj alvenis per senbrujaj paŝoj, kiuj kolektiĝis malantaŭ la muro. La maljuna serĝento tie okupiĝis pri aranĝoj por siaj soldatoj, tiel ĝojega. Kiam la du infanoj preterpasis, li rekonis ilin kaj donis al ili amikan rideton... Ho! Tiu ĉi rideto multe suferigis etan Stenne! Dum tiu momento, li vere volus krei per tuta ĝorgo: "Ne iru tien ni perfidis vin."

Tamen, la altulo diris al li: "Se vi diras, ni estos pafitaj." Timego igis, ke li ne kuraĝis eldiri la veron...

En la urbeto Courneuve ili eniris forlasitan domon por dividi monon tie. La fakto devigis min klarigi, ke la mono estis egale dividita. Kiam eta Stenne aŭdis tintadon de belaj *écu*-j sub sia bluzo kaj pensis, ke li tuj povos partopreni en korko-vetludo, li ne sentis plu lian pekon tiel terura.

Tamen, kiam li estis sola — Malfeliĉa infano! — kaj kiam la altulo disiĝis de li malantaŭ la pordo, li sentis, ke liaj poŝoj fariĝis pli pezaj kaj la mano premanta sur lia brusto pli firma. Por li Parizo jam ne estis la antaŭa Parizo, kaj pasantoj lin rigardis severe, kvazaŭ sciante, de kie li revenis. La vorto "spiono" sonis ĉe liaj oreloj super la bruado de ruliĝantaj radoj de trajno kaj tamburbatoj de milita ekzercado laŭlonge de la kanalo.

Fine li revenis hejmen kaj vidinte sian patron foresti, li tre ĝojis. Li rapide surgrimpis sian ĉambron kaj kaŝis tiujn pezajn *écu*-ojn sub la kapkusenon.

Patro Stenne neniam aspektis tiel afabla kaj ekscitita kiel ĉi-nokte, kiam li revenis. Oni ĵus ricevis novaĵon el aliaj provincoj, la nacia situacio estas ĉe favora turnopunkto.

Ĉe vespermanĝo, rigardante la pafilon pendantan sur la muro, tiu ekssoldato afable diris kun rideto al sia filo: “Ha, infano, se vi estus plenkreskulo, kiel vi senkompatate rezistus al la prusoj!”

Ĉirkaŭ je la oka horo, ili aŭdis kanonpafojn.

“Estas Aubervilliers... ili komencas interbatali en Le Bourget,” diris la ĉionjesulo, kiu bone scias ĉiujn defendajn fortikaĵojn. Kun pala vizaĝokoloro eta Stenne, preteksante grandan lacecon, enlitiĝis, sed li ne povis endormiĝi. La kanonoj senĉese tondris. En lia menso aperis kiel fulmo sceno de nacia taĉmento de speciala misio nokte surprizatakas prusojn sed renkontas trupon en embusko. Li rememoris la serĝenton ridetantan al li kaj vidis lin fali en la neĝteron, kiom soldatoj kiel li ! ...

La kosto de la sango de ĉiuj soldatoj restis kaŝita sub la kapkuseno de li, eta Stenne, soldata filo... Larmado faris lin preskaŭ senspira. Li aŭdis, ke lia patro en apuda ĉambro paŝadas kaj malfermas fenestron. Sur la placo ĉe la domo sonis klaronado por kolektiĝo. Batalionoj da soldatoj de nacia taĉmento de speciala misio estis sin numerantaj kaj preparis sin por ekmarŝo. Evidente sekvis vera batalo. Ĉi tiu malfeliĉa infano ne povis sin deteni plu kaj ekploris. “Kio okazas al vi?” Patro Stenne eniris kaj demandis al li. Ne plu sin detenante, la infano saltis teren de la lito kaj genuiĝis ĉe la piedoj de sia patro. Dum lia saltado, tiuj *écu*-oj ruliĝis sur la teron. “Kio estas tio? Vi ŝtelis

ilin?” demandis la maljunulo, tremante tutkorpe.



Do eta Stenne rakontis unuspire, kiel li iris al la prusa kazerno kaj kion li faris tie.

Ju pli li rakontis, des pli malstreĉita li sentis sin.

Konfesinte sian pekon, li sentis sin multe pli malŝarĝigita ... Aŭskultante al sia filo, maljuna Stenne montris teruritan mienon. Finaŭskultinte kion lia filo rakontis, li ekploris, kovrante sian vizaĝon.

“Patro, patro ... ” la filo dezirus diri ion.

La maljunulo puŝis lin, kaj relevis la monon sur la tero.

“Ĉu ĉioma mono estas ĉi tie?” li demandis.

La filo kapjesis. La maljunulo dekroĉis fusilon kaj kartoĉrubandon de la muro, metinte la monon en la poŝon.

“Nu,” li diris “mi iros redoni la monon al ili.”

Li ne plu diris alian vorton, kaj eĉ la kapon ne turnis. Li descendis aliĝi al la vicjo de la taĉmento de speciala misio, kiu ekmarŝis en la nokto. De tiam vidis neniu lin.

Notoj:

1. *écu*-oj — La antikva monero de Francio

2. la pordego de Flanders — Situi en la nordorienta parto de Francio kaj la sudokcidenta parto de Belgio

ilustrita de Tatjana Ĥomjakova
Elfrancigis



Lin Leming (Ĉinujo)



Eldonas Redakcio de *Penseo*
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,
Chongqing, 400020, Ĉinio
Retadreso: vejdo@163.com
Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin
turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm aŭ
<http://gazetejo.org/eo/penseo>

